

Thomas Moore,

'T is the Last Rose of
Summer

Thomas Moore,

La lasta rozo

tradukita de Antoni Grabowski

'T is the last rose of summer left
blooming alone;
All her lovely companions are fa-
ded and gone;
No flower of her kindred, no rose-
bud is nigh,
To reflect back her blushes, to gi-
ve sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one!
To pine on the stem;
Since the lovely are sleeping, go
sleep thou with them.
Thus kindly I scatter thy leaves
o'er the bed,
Where thy mates of the garden lie
scentless and dead.

So soon may I follow when friend-
ships decay,
And from Love's shining circle
the gems drop away.
When true hearts lie wither'd and
fond ones are flown,
Oh! who would inhabit this bleak
world alone?

Thomas Moore,

La lasta rozo

*tradukita de Clarence
Bicknell*

Jen floras sola, forlasita la lasta ro-
zo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte
kušas jam sur tero.
Ne estas ia flor' parenca, nek roz-
burgono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la so-
pirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene
sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru,
dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable disjetas sur
bedeto jena:
Vi kušu apud senaroma, malviva
kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' ami-
keco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos
lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj, sente-
maj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en
malvarma mondo?

Jen la lasta rozeto de fo-
ra somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj jam
velkis sur ter'!
Ne restas parenco, ne
unu rozflor'
Partoprenas kompate en
ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tut-
sola, ho roz'.
Iru dormi kun ili en pac-a
ripoz'.
Nun viajn petalojn
disjetas mi for
Al viaj kunuloj sen viv',
sen odor'.

Tiel same volonte for-
mortus mi mem,
Se ne plu min atendus
amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro en tiu
ĉi mond'
Volus loĝi izola sen amo-
respond'?

...

...

...

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25).*

Arg-530-1053 (2014-11-04 07:57:07)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo <http://www.franks.org/fr01066.htm>. Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la vikipedian retejon http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore.

*Traduko de la Angla poemo “T is the Last Rose of Summer” de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.

*Traduko de la Angla poemo “T is the Last Rose of Summer” de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (*1842-10-27 – †1918-07-17).*

Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikisource.org/wiki/AEktoro:Bicknell_C._,-Bordigheza.